

La Laborista Esperantisto

Arbetar-Esperantisten

Nr 1-2 | oktober 2017

N-ro 1-2 | oktobro 2017

Tvåspråkig tidning utgiven av SLEA | Dulingva gazeto eldonita de SLEA

Kas, Alia Mondo Eblas!

estas sen ekspluatado, sen persekutado.
on libere decidi sian sorton kaj vivon!
ĝu por Paco, Egaleco kaj Justeco
simo kaj ĉiuj subpremadoj de aŭtoritatoj
de lingva malegaleco per ESPERANTO.



Innehåll | Enhavo

Sindikataj novaĵoj

Novaĵoj de libroservo

Eldono de Malvarma bufedo

SATs 90e kongress i Seoul

La 90-a Kongreso de SAT en Seulo

Arbetar-Esperantisten är en tvåspråkig tidning på svenska och esperanto som ges ut av Svenska arbetaresperantoförbundet. Tidningen drivs helt ideellt.

La Laborista Esperantisto estas dulingva (sveda-Esperanto) membrogazeto de Sveda Laborista Esperanto-Asocio. La gazeto estas krea kaj eldonata tute senprofiteme.

Redaktionen / La redakcio:

Daniel Sandgren
Marcus Hansson

Retejo:

www.slea.se

Retpoŝto:

arbetaresperantisten@hotmail.com

La estraro de SLEA:

Prezidanto: Daniel Sandgren

Sekretario: Guy Coste

Kasisto: Marcus Hansson

Ceteraj estraranoj:

Soile Lingman

Inga Johansson

SAT-perantino / SAT-kontakt:

Inga Johansson

Retpoŝto: ishim@hotmail.com



541-826

Svanmärkt trycksak

LaserTryck.se

Enhavo

sida / paĝo

• Gazeta informo	2
• Ledare / Redaktangulo	3
• Malvarma bufedo	4
• Antaŭparolo de Malvarma bufedo	5
• Kelkaj novaĵoj el la mondo	6-9
• Raporto pri la 90-a SAT-Kongreso	10
• Rapport från SATs 90e kongress	11
• Deklaracio de la 90-a SAT-kongreso	12
• Uttalande från den 90e SAT-kongressen	13
• Novaĵoj de libroservo	14

Redaktionen vill tacka alla som på något sätt bidragit till detta nummer och de som under året skänkt pengar till förbundet!

**LASTA DATO POR LA
MANUSKRIPTOJ AL LA SEKVONTA
ELDONO ESTAS 2017-11-30.**

**SISTA DATUM ATT SKICKA IN
TEXTER TILL KOMMANDE NUMMER
ÄR 2017-11-30.**

Aper-plano 2017
decembro

Atentu! Ni havas novan adreson.
Uppmärksamma! Vi har en ny adress.

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Elektronvägen 2
141 49 Huddinge
Sverige / Svedio

Ledare

I samarbete med Esperantoförlaget har vi nu gett ut Malvarma bufedo av Jenny Wrangborg! Malvarma bufedo är Jenny Wrangborgs hyllade diktsamling *Kallskänken* översatt till esperanto av Gunnar Gällmo. På grund av arbetet med utgivningen har tyvärr utgivningen av vår medlemstidning halkat efter. Vi hoppas ni har överseende med detta och uppskattar boken som alla medlemmar nu ska erhållit ett exemplar av som compensation. Vi vill även passa på att tacka alla som på något sätt hjälpt till med att förverkliga utgivningen. Nu har vi börjat jobba med att leta återförsäljare för att distribuera boken. Vill du hjälpa till med distributionen eller känner du till tänkbara återförsäljare så tveka inte att höra av dig. I detta nummer blir det självklart mycket fokus på boken men du kan också läsa om SATs 90e kongress som hölls i Seoul i somras och lite kortare fackliga nyheter.

Trevlig läsning och glöm inte att betala din medlemsavgift om du inte redan gjort det!

Redaktangulo

En kunlaboru kun Eldona Societo Esperanto ni nun eldonis Malvarma bufedo de Jenny Wrangborg! Malvarma bufedo estas la akklamita poemaro de Jenny Wrangborg, *Kallskänken*, tradukita al Esperanto de Gunnar Gällmo. Pro la laboro pri la libro kaj ĝia eldono la eldono de nia gazeto bedaŭrinde malfruiĝis. Ni esperas ke vi indulgas kun ĉi tio kaj ŝatas la libron. Ĉiuj membroj nun ricevis la libron kiel kompensaĵo. Ni ankaŭ volas diri dankon al ĉiuj, kiuj helpis nin en iu maniero por realigi la eldono de la libro. Nun ni komencis labori por trovi revendistojn kiel eblas distribui la libron. Ĉu vi ŝatus helpi nin kun la distribuado aŭ ĉu vi scias eblajn revendistojn ne hezitu kontakti nin. En ĉi tiu numero ni kompreneble fokusas pri la libroeldono, sed vi ankaŭ povas legi pri la 90-a SAT-Kongreso okazigita en Seulo ĉi-someron kaj kelkajn mallongajn sindikatajn novaĵojn.

Agrablan legadon kaj ne forgesu pagi vian membrecon, se vi ne jam faris tion!

JARKOTIZO | MEDLEMSAVGIFT

- Unuopa membro/Enskild medlem 150:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-
- Ungdomar upp till 20 år, arbetslösa, studerande och pensionärer 100:-
- Stödmedlemskap för organisationer 250:-

Membriĝu / Bli medlem!

Plusgiro 5 31 60 - 8.

(Sv.Arbeta.Esperanto-förb.)



Atentu!

Pri la enhavo de La Laborista Esperantisto respondas la kontribuintoj mem.

Uppmärksamma!

Skribenterna ansvarar själva för sina texter. Det är alltså inte nödvändigtvis SLEAs åsikter som presenteras.

Malvarma bufedo

Jenny Wrangborg



I samarbete med Esperantoförlaget ger vi nu ut Jenny Wrangborgs hyllade diktsamling *Kallskänken* som pocketutgåva på esperanto. Boken är översatt av Gunnar Gällmo. Korrekturen utförd av Jan Setreus och omslaget är gjort av serieskaparen Mattias Elftorp.

Kallskänkan jobbar på ett kafé i Göteborg. Ett myller av människor och deras öden omger henne. Kaféets kallskänk, hennes plats, blir ett nav för vänskap, passioner och drömmar. Men även för tankar om jämlikhet och att det borde vara på ett annat sätt. *Kallskänken* är en diktsamling och en kollektiv historia, berättelsen om kamp bland arbetande människor i ett kök. Jenny Wrangborg är kallskänka och poet.

Boken kan redan nu beställas på vår hemsida www.slea.se eller genom www.uea.org

Boken kostar 70 kr (frakt tillkommer)
(50 kr för slea-medlemmar)

Aŭtoro: Jenny Wrangborg

Antaŭparolo: Göran Greider

Eldoninto: SLEA (en kunlaboru kun Eldona Societo Esperanto)

Tradukisto: Gunnar Gällmo

Korektisto: Jan Setreus

Kovrilo: Mattias Elftorp

Eldonjaro: 2017

Paĝoj: 106

ISBN: 9789185288458

Priskribo: La bufedistino laboras en kafejo en Gotenburgo. Ĉirkau ŝi svarmas homoj kun siaj sortoj. La malvarma bufedo, ŝia laborejo, iĝas nabo por amikeco, pasioj kaj sonĝoj. Sed ankaŭ por pensoj pri egaleco, kaj la ideo ke ĉio devus esti alia.

”La malvarma bufedo” estas poemaro kaj kolektiva historio, la rakonto pri lukto de laborantaj homoj en kuirejo.

La libro estas aĉetebla tutmonde ĉe libroservo de UEA (www.uea.org).

”Malvarma bufedo” ne bezonas antaŭparolon

Malvarma bufedo de Jenny Wrangborg estas verkita antaŭ ne multaj jaroj, sed kiam mi denove legas ĝin – probable la dekan fojon – mi sentas ke ĝi estas klasikaĵo. Jam nun. Kaj vivanta klasikaĵo. Jen ”Malvarma bufedo”, kiel tremanta sago ĵus trafinta la celtabulon kiu estas mia koro, la koro de la plej multaj. La poemoj de Wrangborg estas aliaj ol preskaŭ ĉio aperinta en la poezio dum la lastaj dudek kvin jaroj. Ŝi difinas sian sintenon malkaŝe, tamen ne en rigide politika senco, sed por la sperto de la laborista klaso, kaj ŝi faras tion majstre sen zorgi pri literaturaj tendencoj: ”la poetoj tatuas la lingvon de la potenco sur la paĝoj, ili baras la rigardon de la legantoj”, ŝi ie skribas kolere.

Tial ĉi tie mi ne havas la impreson legi poemojn, sed pli sidi apud homo kiu rakontas pri sia laboro en la restoracioj de Gotenburgo, kaj pri ĉiuj homoj kiujn ŝi renkontis tie. Kaj kia galerio de homoj, kiuj malfermas sin ”magie inter la maŝinoj” en la restoracia kuirejo! Jen la kuiristo kiu plukas la kelnerinojn, la regululo kiu sidas la tutan antaŭtagmezon kun taso da kafo kaj molkore demandadas kiel estas por la dungitaro – aŭ la uloj de la supera klaso kiuj grumblas ĉar malrapide servataj, kaj la estro kiu tintigas sian malbenatan ŝlosilfaskon. Per dek du linioj Wrangborg kaptas teruran laborlokakcidenton, kaj per nur unu humurplena linio ŝi kaptas la ĉiutagan kontraŭstaron en abomeniga laborloko: ”se oni iras en la fridejon oni ne devas aŭdi kion diras la estro”

Kia tekstaro estas ĉi tio? Respondo: Kolera kaj ruza raportlibro el la nova servotundro, kie hodiaŭ laboras kreskanta parto de la okcidentmonda laborista klaso. Plejofte kun malbonaj salajroj, nesekuraj kondiĉoj, granda streĉo. Restoracidungitoj, purigistoj, telefonistoj en vokocentroj, buskondukantoj, subflegistinoj: ĉiuj profesioj funkciigantaj la socion, sed diable malalte respektataj.

Antaŭ pli ol duona jarcento, Stig Sjödin verkis sian klasikaĵon *Sotfragment* (”Fulgofragmentoj”) pri la laboristoj en feruzino en Sandviken. *Malvarma bufedo* estas el nia tempo. Rimarkinde estas ke la demandoj ofte restas la samaj por la gravaj poetoj de la laborista klaso: Kiel kontraŭstari? Kiel protekti sian dignon? Kelkaj tonoj de Stig Sjödin kaj de multaj aliaj laboristaj poetoj – ekzemple Harry Martinson – reaperas en la poemoj de Wrangborg. Sed tiam ne unuavice pro literatura influo, sed ĉar oni esprimas la samajn bazajn spertojn de subpremo.

Malvarma bufedo ne bezonas antaŭparolon. La tuta libro fakte estas tiu antaŭparolo, kiun ni ĉiuj devas legi por kompreni la socian realecon ĉirkaŭ ni.



13/09/2017

La tago de mobilizado kontraŭ la reformo de la laborkodo en Francio lanĉis unuan averton al la registaro. Inter 220 000 personoj laŭ la aŭtoritatoj, kaj 400 000 laŭ la Konfederacio Ĝenerala de la Laboro (KĜL), defiladis hieraŭ en la francaj urboj. Tio estas preskaŭ tiom da personoj, kiom en la 9a de marto 2016, kiu estis la unua manifestacio kontraŭ la laborleĝo. La veto estis gajnita por tiu unua tago de mobilizado lanĉita de la KĜL, sed la prezidento Emmanuel Macron ne perdis, opinias kelkaj ĵurnaloj ĉi-matene. En la defiladoj, la kontraŭ-Macronaj sloganoj floris. Menciinde estas ankaŭ kelkaj apartaj manifestaciantoj, kiel tiu kantisto, kiu kantis «*la laborleĝo, tio estas aĉa!*» aŭ alia, nuda kaj ludante gitaron, kiu kantis «*Ni nenion allasos*», fronte la CRS.

La registaro asertas, ke ĝi aŭskultis la timojn de la francoj, kaj alportos respondojn. Tio estas evidenta ŝanĝo de sinteno post la promeso de Macron, ke li cedos «*nek al la pigruloj, nek al la cinikuloj, nek al la ekstremistoj*».

Aliaj tagoj de mobilizado estas antaŭviditaj la 21an kaj 23an de septembro.

Kolizioj okazis en kelkaj defiladoj en Parizo kaj Marsejlo. En tuta Francio, nur deko da personoj estis arestitaj. Gravaj damaĝoj ne okazis. Manifestacianto estis vundita.

<http://neniammilitointerni.over-blog.com/tag/monda%20socibatalo/>

<http://fr.euronews.com/2017/09/13/des-francais-dans-les-rues-un-coup-de-semonce-contre-macron>



Peruo

Pli ol 70 tagoj da striko en la nacia edukado

07/09/2017

Malgraŭ la represio kaj la amasinforma kampanjo, la striko de la peruaj instruistoj daŭras de pli ol 70 tagoj.

Fine de 2016, la registaro de la novliberala prezidento Pedro Pablo Kuczyski blokis la buĝeton de la nacia edukado kaj de la sansektoro. Laŭ la registaro, la 380 000 instruistoj en la publika sektoro estas tro multnombraj. Pro tio, li starigis «taksadon je puna karaktero», al kiuj devas submetiĝi la instruistoj. Tiuj, kiuj rifuzos ilin estos eksigitaj el la publika funkciado.

La 15an de junio, en Kuzco, la sindikato de instruistoj komencis senliman strikon por altigo de la salajroj kun nacia eĥo. Gepatroj kaj eĥ liceanoj surstratiĝis subtene al la instruistoj. Poste en la tuta regiono, la instruistoj ekstrikis.

Komence de aŭgusto, miloj da instruistoj el la tuta lando konverĝis al Limao, kie okazis amasa mitingo centre de la urbo. Temas nun pri la plej impona movado de antaŭ pluraj jaroj. La striko vastiĝis en la tuta lando, kun malsatstrikoj kaj okupadoj de publikaj konstruaĵoj en preskaŭ ĉiuj grandaj urboj.

La registaro ne hezitis subpremi perforte la movadon. Unue, ĝi dekretis, ke la striko ĉesu la 7an de aŭgusto, male ĝi efektivigos maldungojn pro disciplinaj motivoj. Tamen, la striko ne ĉesis. La registaro lanĉis poste veran amasinforman kampanjon kontraŭ la instruistoj. Pluraj amas-komunikiloj deklaris, ke la movado kondukita de la sindikatoj de instruistoj, estas manipolata de la terorisma organizaĵo Luma Vojo.

Tio ne sufiĉis por senkuraĝigi la instruistojn. Pro tio, la registaro promulgis la 29an de aŭgusto, urĝan dekretan, kiu kvalifas la strikon kontraŭleĝa kaj komencis uzadi amase polican subpremon. Kelkaj instruistoj arestitaj dum manifestacioj riskas ĝis 8 jaroj da malliberejo, akuzitaj pri «perforto kontraŭ la policistoj». Pasintan vendredon, la bildoj de la polica perforto cirkulis en la sociaj retoj, kio riskas plifortigi la mobilizadon de la instruistoj.

<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2017/09/peruo-pli-ol-70-tagoj-da-striko-en-la-nacia-edukado.html>



Tanzanio

20 personoj akuzitaj pri samseksemo, arestitaj en Zanzibaro

18/09/2017

Dudek personoj akuzitaj pri samseksemo, el kiuj dek du virinoj, estis arestitaj en Zanzibaro, anoncis sabaton la polico de tiu duon-memstara arkipelago, kiu apartenas al Tanzanio. En tiu lando, samseksemo estas severe subpremita.

«Tiuj personoj estas implikitaj en samseksemaj aktivecoj. Ni arestis kaj nun pridemandas ilin. La polico ne povas ignori tiun praktikon», deklaris sabaton en la registara tanzania televidkanalo TBC1, la regiona majoro de la polico, Hassan Ali Nasri.

La respondeculo ne precizigis la daton de tiuj arestadoj sed indikis, ke dek du virinoj kaj ok viroj estas koncernataj.

Lau TBC1, la arestadoj okazis en hotelo. La personoj arestitaj sekvis formadon de la NRO Bridge Initiative Organization, oficiale registrita de la registaro de Zanzibaro, por plenumi programojn de edukado kontraŭ aidsos.

En februaro, Tanzanio ordonis la fermadon de sancentroj specialigitaj en lukto kontraŭaidsos. La aŭtoritatoj akuzas ilin pri promocio de samseksemo.

Vira samseksemo estas punebla en Tanzanio per gravaj punoj de malliberejo, sed antaŭnelonge, la aŭtoritatoj komencis kontraŭ-gejan retorikon.

La tanzania helpministro pri Sano, Hamisi Kingwangalla, asertis vendredon antaŭ la Parlamento, ke la lando daŭrigos sian lukton kontraŭ samseksemo.

«Ni luktas per ĉiuj niaj fortoj kontraŭ la grupoj, kiuj subtenas samseksemon en nia lando», asertis la help-ministro.

Tiujn lastajn monatojn, la tanzania registaro ankaŭ promesis, ke la eksterlandanoj, kiuj defendas la rajtojn de la samseksemuloj estos forpelitaj de la lando.

Samseksemo estas kontraŭ-leĝa en 38 el la 54 afrikaj landoj, kaj punita je morto en Maŭritanio, Sudano kaj Somalio, laŭ "Internacia Amnestio".

Årsmötet La jarkunveno 2017



Arbetarrörelsens Arkiv och Bibliotek i Flemingsberg

(Sv) Kortfattat om mötet

25e februari höll Svenska arbetaresperantoförbundet sitt årsmöte på Arbetarrörelsens arkiv i Flemingsberg. Arkivarie Lars Gogman välkomnade alla med ett föredrag om arkivet www.arbark.se och dess historia. Efter en inledande fika öppnade kassören mötet. 10 deltagare närvarade på mötet som efter genomgången dagordning avslutades kl 16:30 och följdes av fika, bokbord och diverse försäljning av esperantorelaterade prylar. För medlemmar medföljer bifogat detaljerat mötesprotokoll.

(Eo) Mallonge pri la kunveno

La 25-an de februaro, la jara kunveno de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio okazigita ĉe la Arkivoj de la laborista movado en Flemingsberg. La arkivisto Lars Gogman bonvenigis ĉiujn kun prelego pri la arkivo www.arbark.se kaj ĝia historio. Post komenca kafumado la asocia kasisto malfermis la kunvenon. 10 partoprenantoj ĉeestis de la kunveno. Post la tagordo la kunveno fermiĝis je 16:30. Post la kafumado sekvis vendoj de libroj kaj aliaj esperantaĵoj. Ĉiu membro ricevas kunsenditan protokolon pri la kunveno kun pli da informo.

Raporto pri la 90-a SAT-Kongreso

La 90-a Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazis de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto en la urbeto Gimpo, apud Seulo, Koreio. Dum la semajna kongreso 105 kongresanoj el 23 landoj, 6 kontinentoj plenplene ĝuis liberecan kaj sennaciecan etoson de la kongreso, kiu estis unuafoje okazigita en Azio.

Pli ol 20 prelegoj estis preparitaj por la kongresanoj el 23 landoj. Krom la tagoj de la kongresa ekskurso, energiaj prelegoj kaj intensaj diskutoj daŭris dum la kongreso pri jenaj temoj: Veganismo, Nuklea Akcidento en Fukuŝimo en Japanio, Evoluo de A.I.(Aretefarita Inteligento) kaj ĝia influo al socio, Kandelluma Revolucio en Koreio dum 2016~7, Absoluta Demokratio – Demokratiigo de Ĉiuj Demokratioj, La Rusa Revolucio en 1917, Pri Unuiĝo de Nord- kaj Sud-Koreio, Influo de Pejzaĝo, Esperanto Movado, Lingvaj Problemoj, Nuntempa Monda Kapitalismo, Nuntempa Situacio de Kubo kaj D.R.Kongo, Fak-agado en la Reto(Fejsbuko) ktp.

Samtempe okazis laborkunsidoj de SAT, en kiuj estis proponitaj diversaj opinioj pri la administrado kaj evoluplanoj de la SAT-movado, kaj kunsidoj de diversaj frakcioj de SAT, kiaj Sennaciista, Liberecana, Vegetara, Komunista, Verdula ktp.

Multaj prezentaĵoj, kiaj Korea Folkloro Danco de Espera Mondo, Koncerto de la familia muzikgrupo el Litovio Sepa Asorti, Komedio "La Malfermilo", Aŭkcio per Esperantaĵoj, Korea Opero "Ariari", Japana Te-ceremonio, Muzikado de diverslandaj muzikiloj, Revoluciaj kantoj ktp, gajigis la ĉeestantojn ĉiuvespere.

La 90-a SAT-Kongreso finiĝis esprimante esperon pri kiel eble plej rapida okazigo de la duafoja SAT-Kongreso en Azio. La SAT-flago estis transdonita al la reprezentanto de la urbo Kragujevac de Serbio, kiu gastigos la 91-an kongerson en 2018.

OKK(Organiza Kongresa Komitato) de la 90-a SAT-Kongreso

<http://sat90.org/raporto-pri-la-90-sat-kongreso/>



Rapport från SATs 90:e kongress

Den 90:e kongressen med SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) ägde rum 29 juli till 5 augusti 2017 i den lilla staden Gimpo, nära Söul, i Sydkorea. Under kongressveckan samlades 105 deltagare från 23 länder på 6 kontinenter och njöt av den frihetliga och nationella stämningen. Det var första gången denna kongress ägde rum i Asien.

Mer än tjugo föredrag hade förberetts. Med undantag för utflyktsdagarna hade man kraftfulla föredrag och livliga diskussioner om följande ämnen: veganism, kärnkraftsolyckan i Fukushima i Japan, utvecklingen av artificiell intelligens och dennas inverkan på samhället, ljusrevolutionen i Korea 2016-2017, Absolut demokrati - en demokratisering av alla demokratier, ryska revolutionen 1917, om en förening av Nord- och Sydkorea, landskapets påverkan, esperantorörelsen, språkproblem, den nuvarande världskapitalismen, den nuvarande situationen på Kuba och i Demokratiska republiken Kongo, fackaktiviteter på nätet (Facebook) osv.

Samtidigt hölls arbetsmöten med SAT, där man lade fram flera synpunkter på SAT-rörelsens förvaltning och utvecklingsplaner, och möten med SAT:s olika fraktioner, som de nationslösa, de frihetliga, vegetarianernas, kommunisternas, de gröna osv.

Många föreställningar, som koreansk folkdans med Espera Mondo, konsert med den litauiska familjegruppen Sepa asorti, komedin "La malfermilo", auktion med esperantoobjekt, den koreanska operan "Ariari", japansk tecereemoni, musik på instrument från flera länder, revolutionära sånger osv., glädde varje kväll de närvarande.

SAT:s 90:e kongress slutade med förhoppningen att så snart som möjligt kunna ha ännu en SAT-kongress i Asien. SAT:s flagga gavs vidare åt representanten för staden Kragujevac i Serbien, som står värd för den 91:a kongressen 2018.

Översatt av Gunnar Gällmo



Deklaracio de la 90-a SAT-kongreso

okazinta en Seulo de la 29-a Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto 2017.

SAT:

Salutas la okazigon de la Kandelluma Revolucio en Suda Koreio, en kiu multaj homoj kunvenis kaj manifestaciis por ŝanĝi la registaron, kio estas kuraĝiga demokratia evento.

- Agnoskas la gravecon de popolamasaj kontraŭstaroj al maljustaj registaroj, kiel montris la kandelluma manifestacio en Suda Koreio, avertante kontraŭ la klopodoj de amas-komunikiloj kaj politikistoj manipuli ilin, kaj ĉefe kontraŭ la evidentajn drivojn al milito, kiel okazis en Sirio.
- Apogas finigon de konflikta stato inter Norda kaj Suda Koreioj kaj subtenas daŭran pacigon de la regiono por komuna vivo kaj interkomprenemo de la popoloj, kiuj vivas en la regiono.
- Sugestas pacajn interparolojn en militaj konfliktoj kaj kondamnas ĉiajn sangsoifantajn militaliancojn, unuavice la Nord-Atlantikan Traktat-Organizon (NATO).
- Postulas decajn vivrimedojn kaj laborkondiĉojn por teni homecan vivon al ĉiuj laboristoj en la tuta mondo.
- Notas ke bestobredado estas grava fonto (krom petrol-industrio kaj aliaj) de klimatvarmiĝo kaj ke, konsekvence, pli vegetaĵa dieto estas efika agado laŭ ekologia kaj ankaŭ etika vidpunktoj.
- Kontraŭas, en sia celado al justeco, la suferigojn kaj ekspluatadon rilatajn al seksismo kaj rasismo.
- Kontraŭas mistraktadon de bestoj kaj speciismon.
- Kontraŭas la uzadon de nuklea energio, ĉar la akcidento de nuklea centralo en Japanio, 2011, ĝisfunde detruis kaj eĉ nun daŭre detruas ĉiutagan vivon de la loĝantaro ;
- Malakceptas ĉiujn nukleajn armilojn, rimarkante la Traktaton pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj de UN, rezoluciitan en julio 2017.
- Subtenas la agadon de Solidareco Bona Volo (SBV) en Demokratia Respubliko Kongo por helpi edukadon de junuloj, kiuj suferis pro la militoj.
- Instigas ke ne nur SATanoj kaj esperantistoj, sed aktivistoj ĝenerale pli efike kaj aktive kunlaboru kun kamaradoj el Azio, kadre de nia praktika subteno al la tutmonda solidareco.

<http://sat90.org/>

Sennacieca Asocio Tutmonda

Uttalande från den 90e SAT-kongressen

som sammanträdde i Gimpo/Söul, Sydkorea, 29 juli - 5 augusti 2017,

SAT:

Hälsar arrangerandet av ljusrevolutionen i Sydkorea, där många människor kom samman och demonstrerade för att byta ut regeringen, vilket var en uppmanande demokratisk händelse.

- Erkänner vikten av massmotstånd mot orättfärdiga regeringar, vilket framgick av ljusrevolutionen i Sydkorea, varnar för massmedias och politikernas försök att manipulera dem, och främst för den uppenbara driften i riktning mot krig, så som skett i Syrien.
- Stödjer ett slut på konfliktläget mellan Nordkorea och Sydkorea, och stödjer en varaktig fred i regionen för de boende folkens gemensamma liv och inbördes förståelse.
- Föreslår fredliga samtal i krigskonflikter och fördömer alla blodtörstiga militärallianser, i första hand Nato.
- Kräver anständiga levnads- och arbetsvillkor, för ett människovärdigt liv åt alla arbetare i hela världen.
- Noterar att boskapsskötsel är en viktig orsak (jämfört med oljeindustrin och andra) till den globala uppvärmningen, och att följaktligen en mer vegetarisk kost är en effektiv åtgärd ur både ekologisk och etisk synvinkel.
- Motsätter sig, i sin inriktning på rättvisa, det lidande och den exploatering som vållas i samband med sexism och rasism.
- Motsätter sig djurplågeri och speciesism.*
- Motsätter sig användningen av kärnkraft, då olyckan i atomcentralen i Japan 2011 ödelade, och än i dag ödelägger, invånarnas dagliga liv.
- Accepterar inga kärnvapen, med hänvisning till FN:s traktat om förbud mot kärnvapen, antagen i juli 2017.
- Stödjer Solidareco Bona Volo (SBV) i Demokratiska Republiken Kongo, i dess verksamhet för att hjälpa till med utbildningen av ungdomar som blivit lidande på grund av kriget.
- Uppmanar inte bara SAT-medlemmar och esperantister, utan aktivister i allmänhet, att samarbeta mer effektivt och aktivt med kamrater från Asien, inom ramen för vårt praktiska stöd åt den världsomfattande solidariteten.

* Artförtryck.

Översättare: Gunnar Gällmo

Novajoj de libro servo de SLEA

Libroj



Malvarma bufedo

- Jenny Wrangborg

La bufedistino laboras en kafejo en Gotenburgo. Ĉirkau ŝi svarmas homoj kun siaj sortoj. La malvarma bufedo, ŝia laborejo, iĝas nabo por amikeco, pasioj kaj songoj. Sed ankaŭ por pensoj pri egaleco, kaj la ideo ke ĉio devus esti alia.

”La malvarma bufedo” estas poemaro kaj kolektiva historio, la rakonto pri lukto de laborantaj homoj en kuirejo.

Eldoninto: SLEA en kunlaboru kun Eldona Societo Esperanto

Prezo: 70 kr (50 kr por anoj de SLEA)



La Progresema Esperanto-movado en perspektivo

- G. P. de Bruin, Glodo, Banje, Barthelmes

Represo de du libroj pri la historio de SAT: ”Laborista Esperanto-movado antaŭ la mondmilito” de Gerrit Paulus de Bruin (1936) kaj ”Historio de SAT 1921-1952” (1953).

Eldoninto: La eldona fako kooperativa de SAT

Prezo: 130 kr

SAT-kotizo 2018 | SAT-avgift 2018

Pagu vian SAT-kotizon al plusĝiro de SLEA 5 31 60 -8

2017 Plena kotizo SEK 520:-

2017 Duona kotizo SEK 260:- (senlaboruloj, familianoj, emeritoj kaj junuloj)



Lilla esperanto-ordboken (Ny reviderad upplaga)

- Ebbe Vilborg

Tvåvägs fickordbok, svenska–esperanto, esperanto–svenska. Tredje upplagan, 2016, med många nya ord inom framför allt områden som rör datorer, mobiltelefoni, mat och musik.

Dudirekta poŝvortaro sveda–esperanta, esperanta–sveda. Tria eldono, 2016, kun multaj novaj vortoj precipe en la sferoj komputiloj, poŝtelefonado, manĝoj kaj muziko.

Eldoninto: Eldona Societo Esperanto | Esperantoförlaget

Prezo: 100 kr



La Rakonto pri Kjeŭ

- Nguyễn Du

Longa aventura poemo bazita sur ĉina prozromano.

Eldoninto: Vjetnama Esperanto-Asocio | Eldonejo Thê' Gió'i

Prezo: 180 kr

Diversaĵoj



Stelo tola

Esperanto - lingvo internacia

Flava kaj ruĝa rando kun "Esperanto -- lingvo internacia"; verda stelo sur blanka fono

Dimensio: 7,8 cm

Prezo: 35 kr

Sendu mendojn al la retpoŝtadreso aŭ al la adreso de SLEA sube:

Beställningar skickas till epostadressen eller postboxen nedan:

Retpoŝto:

slea.smolando@hotmail.com

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Elektronvägen 2
141 49 Huddinge
Sverige / Svedio

Afrankoj aldoniĝas je sendo de
libroj/broŝuroj/ diversaĵoj.

Plusgiro: 53160-8

(Sv.Arbet.Esperanto.förb.)

LÄR DIG ESPERANTO!

Esperanto är ett planspråk vars främsta syfte är att underlätta kommunikationen för människor med olika språkbakgrund. Detta "brospråk" är relativt lätt att lära sig på grund av sin regelbundenhet och flexibilitet. Då esperanto inte tillhör någon nation eller något folk är det även mer rättvist att använda än de nationella språken.

ETT FUNGERANDE SPRÅK!

Ett språk dugligt för alla ändamål kan endast uppkomma ur en kollektiv process. Esperanto tillhör och formas av sina användare. Esperanto har använts i över 100 år och används idag i växande omfattning på internet. Dess användare finns idag i hela världen.

FÖR DEMOKRATISK KOMMUNIKATION!

Alla som har erfarenhet av internationell kommunikation vet att språket kan vara ett hinder, men med hjälp av esperanto kan vi umgås som jämlikar.

Seminarium Songas kaj praktik

Ni esperas mondon, kie
Ĉiuj homoj havas potenc
Ni kiel homarano solidari
kontraŭ milito, novliberali
trans landlimoj kaj baroj



Svenska ArbetarEsperantoFörbundet

Sveda Laborista Esperanto-Asocio

Elektronvägen 2

141 49 Huddinge

Sverige | Svedio



www.slea.se